

Saluto kaj prelego de Pierre Hirsch pri Edmond Privat Claude Gacond, 110-a radioprelego, 1965.11.10 & 1965.11.13

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond anoncas la rekomencon de la esperanto-elsendoj kaj raportas pri prelego de Pierre Hirsch dediĉita al Edmond Privat.

Kun multe da ĝojo mi hodiaŭ reprenas mian prelegan funkcion, ĉar mi scias, ke en plej diversaj lokoj de Eŭropo gesamideanoj ŝaltis sian radio-aparaton por reaŭdi la voĉon de Svislando.

Post malbela vetero la suno ĉiam revenas. La esperanta popolo multfoje spertis tiun veron. Se malfeliĉaĵo bremsas momente nian antaŭenan iradon, ni ne perdas kuraĝon, ĉar ni trankvile konscias, ke nia idealo respondas al la nekonscia serĉado de la homaro, tiu homaro, kiu malkovras sian unuecon.

Nubaro povas malheligi nian ĉielon, vento povas kurbigi nian dorson, nia marŝado tamen neniam ĉesos kaj niaj vizaĝoj restos turnitaj al la celo : la malapero de la lingvaj muroj, kiuj dividas la popolojn, kvazaŭ ili estus diversaj grupoj inter si surdaj.

La interrompo de niaj esperantaj elsendoj havis financan kaŭzon. Ĝi eĉ ne daŭris tutan jaron dank'al la komprenemo de nia direktoro kaj tre verŝajne al la plendado de la esperantistaro. De hodiaŭ tiu veado refariĝu amika perletera kaj peronda babilado.

En La Chaux-de-Fonds, horloĝeja urbo en la franca parto de Svislando, konstruiĝas institucio, kiu certe famiĝos en Esperantujo. Kiel mi jam rakontis, antaŭ unu jaro en la urba biblioteko de tiu montara urbo kreiĝis Centro Edmond Privat. Dum tuta jaro sinjoro Pierre Hirsch povis interrompi sian gimnazian instruadon por ekmunti la salonon, kiu honoros nian mondfaman samideanon. La sistema studado de miloj da leteroj malkovrigis grandan intelektan riĉaĵon kaj unua verko pri la korespondado inter Edmond Privat kaj Romain Rolland baldaŭ konigos en la literatura mondo la ekziston de tiu arkivejo.

La 13-an de junio la esperantistaro estis invitita partopreni tre interesan renkontiĝon en tiu biblioteko. Ekspozicio titolita **Paco kaj Libereco** montris diversajn altvalorajn dokumentojn el la fondaĵo Edmond Privat kaj estis komentita de sinjoro Pierre Hirsch. Du valoregaj prelegoj prononcitaj en la legsalono antaŭ sesdeko da atentemaj gesamideanoj venintaj el ĉiuj partoj de nia lando, el la najbaraj landoj kaj eĉ el Nordameriko, prezentis la internacian radiadon de Edmond Privat kaj lian poezian esprimon. Hodiaŭ ni diros kelkajn vortojn pri la prelego de Pierre Hirsch, venontan semajnon ni resumos tiun de Henri Vatré. La teksto de tiuj du altvaloraj kontribuajoj aperis en *Inter Ni*, la organo de Esperanto-Edukistaro de Svislando. Se vi deziras ricevi tiun ekzempleron, simple skribu al la Svisa Kurtonda Radiostacio en Berno.

« *Mia laboro devigis min legi multnombrajn leterojn ĉiaspecajn adresitajn al Edmond Privat* », diris Pierre Hirsch. Mi daŭre citas lin. « *Tiuj leteroj estis skibitaj en ĉiuj mondpartoj, de personoj el ĉiaj kondiĉoj, de la simpla poŝtisto ĝis la prezidanto de grandega respubliko. Du faktoj sin trudis al mi dum la lego de tiu giganta korespondado. Unue, estas mirige konstati, ke jam aĝaj personoj, maljunuloj eĉ, personoj kies pozicio tre altrangis, fidis al Edmond Privat, kiam li mem estis ege juna.* » Kaj Pierre Hirsch menciis la maljunan ĝenevan filozofon Ernest Naville, la profesoron Flournoy, du famaj ĝenevanoj, la filozofon William James, profesoro en Universitato Harvard en Usono, la Nobel-premiito 1913 Charles Richet, la francan akademianon Emile Faguet, ktp. Ni povus plilongigi la liston, ni nur ankoraŭ menciui la ĉefan patrioton Masaryk kaj Nansen, kiu kampanjis por la malsatantoj.

Pierre Hirsch parolis poste pri la dua fakto. « *La dua okulfrapa observo estas, ke Privat konis tutan aron da famuloj en la epoko, kiam ili estis kvazaŭ nekonataj, nekonataj de la ĝenerala publiko almenaŭ. En 1916, kiam li interrilatas kun Edvard Benes, tiu ĉi estas*

Saluto kaj prelego de Pierre Hirsch pri Edmond Privat
Claude Gacond, 110-a radioprelego, 1965.11.10 & 1965.11.13

malriĉa rifuĝinto, kiu eĉ ne posedas la monon necesan por aĉeti paron da ŝtrumpoj. En 1931 Edmond Privat fariĝas la akompananto de Gandhi. Por la vasta publiko en Eŭropo, kiu estas Gandhi en tiu tempo ? « Nuda fakiro » laŭ la malestima esprimo de Winston Churchill. La unua letero de Pandito Jawaharlal Nehru datiĝas, krom eraro, de 1936. Kiu en tiu tempo konas Nehru ? Dek unu jarojn pli malfrue Nehru fariĝos ĉefministro de Hindujo. Estas pro sia kredo al paco kaj libereco, ke Edmond Privat konatiĝas kun homoj inter la plej rimarkindaj en nia jarcento en la momento, kiam ili ankoraŭ estas nuraj agadantoj nekonataj ekster sia propra agadmedio. »

Vi aŭdis Radio-Svislandon, kiu per la voĉo de Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-